

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.
La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.

Patrick en Sud-Ameriko

(Sur la foto :
Kun brazilaj
esperantistoj.
De maldekstre,
Patrick estas
la kvina.)



Patrick ETIENNE de multaj jaroj estas membro de Hérerville Esperanto. Li partoprenis la UK-on de Varsovio en 1987 kaj plurajn vojaĝojn organizitajn de nia loka societo en Ĉekio, Germanio, Rusio. Patrick ankaŭ emas unuope vojaĝi en tre foraj landoj, kiel Brazilo kiun li vizitis por la dua fojo en 2012.

Patrick, kial vi decidis en 2004 vojaĝi al Brazilo ?

Tuthazarde ! Mi aliĝas al organizaĵo kiu interrilatigas volontulojn por helpi asociojn aŭ produktantojn. Por utile vojaĝi, ni diru. Tiel mi jam ĝardenumis en brita edukejo kaj ekologia asocio en Svislando. En la nomaro 2004a, mi elkovris la adreson de Bona Espero, brazila edukejo kiu interesis min despli, ke ĝi uzas esperanton.

Kio estas Bona Espero ?

Bona Espero estas lernejo por infanoj kiuj travivas sociajn problemojn. Kreita de brazilanoj, la lernejo estis gvidata

dum multaj jaroj de gesinoroj Gratapaglia, germano-itala paro. La tasko estas tre malfacila sed multaj infanoj estas sukcese helpataj por trovi dignan rolon en la socio (legu kaj spektu la verkojn de Roman Dobrzynski pri Bona Espero).

.../...

En tiu numero :

Novjara festo, Grésillon.	2
Lecionoj por knabo.	3
Ludeto : Vorta riĉeco de Esperanto	4/6
Staĝo Hérerville Svetlana Smetanina	5/6
2013 : Kotizoj, abonoj	6

Paĝo 2a

Dank'al la konstanta prizorgo de la eduka teamo, mi vidis infanojn viglaj kaj ĝojaj en tre granda bieno.

Kion faris vi ?

En 2004, mi laboris kun Orlando, la masonisto kiu tiam konstruis garaĝon. Ĉar tiu unua sperto plaĉis al mi, mi decidis reiri en 2012. Estas multe da laboro ĉar Bona Espero deziras esti nutre kiel eble plej sendependa. Multaj fruktoarboj nun kreskas en la vasta bieno kaj mia tasko estis purigi kaj senherbigi ĉiun arbon. Mi laboris dum kvin semajnoj sub arda suno.

Ĉu tiu dua sperto similis al la unua ?

Bona Espero plu aktivas por helpi kaj eduki la infanojn sed travivas malfacilan momenton ĉar gesinjoroj Grattapaglia, nun maljunaj, deziras anstantaŭantojn sed estas malfacile transdoni tian organizaĵon kiu estis la kerno de ilia esperantista vivo. Videble, la afero estas komplika ĉar novaj homoj volus alimaniere evoluigi la edukejon.

Tamen mi estis tre kontenta revidi tiun sovaĝan kaj belan lokon. La agado estas laŭdinda kaj mi sentis min utila.

Vi poste vojaĝis al Argentino.

Jes, por atingi la flughavenon de Buenos Aires. Mi deziris vidi la faman monton Akonkagvo sur kiu Tiber Sekelj plantis la verdstelan flagon (pri T. Sekelj, legu la tre interesan artikolon en la aŭgusta numero de « Le Monde de l'Espéranto »). Tamen tiu vojaĝo estis pli longa ol mi antaŭvidis ĉar mi serpentumis de loko al loko laŭ la esperantistaj gastigantoj.

Ĉu esperanto estis utila ?

Krom kelkajn vortojn el lingvaj metodoj, mi ne scipovas la hispanan kaj la portugalan. Mi ne volis uzi la anglan ĉar en Argentino tiu lingvo ankoraŭ memorigas dolorigajn eventojn. Dank'al la asociaj adresaroj (de UEA, « Pasporta Servo, ktp), mi estis en ĉiu etapo gasto de lokaj esperantistoj. Ili estis tre atentemaj kaj helpemaj. Kelkfoje malfrue en la nokto, oni atendis ĉe la bushaltejo por min akcepti.

Dank'al tiu amika reto, mi sentis min pli trankvila dum tiu plursemajna kaj ofte aŭtobusa vojaĝo.

Intervjuo farita de Yves NICOLAS




NOVJARA FESTO en GRÉSILLON :

Tradicie, la Kulturdomo de Esperanto organizas jarfinan renkontiĝon en sia Kastelo de Gréziljono. La festo, taŭga por familioj, ĉiujare plezurigas homojn per bona etoso, festa regalado kaj ĉarma kadro. Ni invitas vin aliĝi, vizitante la retejon de la Kulturdomo <http://gresillon.org/jarfino>.

Por tiuj, kiuj (ankoraŭ!) ne konas la Kastelon situanta en la bela Anĵua regiono en Francio, ĝi reprezentas de 1952 komunan renkontiĝan lokon por ĉiuj esperantistoj. Ni instigu vin malkovri aŭ reviziti tiun belan parton de Francio, kaj tiun heredaĵon de la esperantistaro, por esti parto de ĝia vivo kaj aktoro de ĝia disvolvo. Tie okazas staĝoj, renkontiĝoj, kursoj, festoj la tutan jaron, kaj specife ni deziras ebligi al ĉiuj celebri en amika rondo la novan jaron.

Konsciaj pri neceso limigi la kostojn por ebligi la plimulton profiti Esperantiajn eventojn, ni aranĝos veturadon, varmigis komfortajn ĉambrojn kaj preparos por vi bongustegajn manĝaĵojn, kaj certas ke tiel multaj profitos agrablan, ĝojigan renkontiĝon denove ĉi jare.



En la unua novelo, kiu donis sian titolon al la libro, "Leçons pour un garçon", knabo memoras pri siaj ama kaj seksa edukadoj. La juna virino en la desegnaĵo de la koverto ilustras la konkludon de la dua novelo, "Libella". La lasta, « La décoration », pritraktas la malfacilajn laborkondiĉojn en minejo.


Eldonita de "Impeto" en oktobro 2012, "Leçons pour un garçon" estos disponebla dum la 18 etapa prelegvojaĝo de M. Bronŝtejn en januaro 2013.

* Nia urbo ĝemelas kun Tiĥvin, la urbo de Mikaelo Bronŝtejn, depost 1992.

Yves NICOLAS

2012 estas la Jaro de la lingvoj kaj de la literaturoj de Francio kaj de Rusio.

Por kontribui al tiu kultura interŝanĝo inter ambaŭ landoj, tri membroj de Hérouville Esperanto*, kaj samideano de la pariza regiono, decidis francigi tri novelojn el novelaro "LEKIONOJ POR KNABO" de Mikaelo Bronŝtejn* eldonita de "Impeto" en 2009. Kontrolis kaj ilustris ilin aliaj membroj de nia loka asocio.



Mikaelo BRONŜTEJN prelegos en la urba biblioteko de Hérouville, la 5an de januaro je 17h00. (pri lia libro antaŭ nelonge francigita : « Leçons pour un garçon »).

Informoj :

Yves NICOLAS : tel : 06 44 87 22 48 ivnicolas@sfr.fr



Poŝtmarkoj aperintaj okaze de la 125a jariĝo de Esperanto : **Nederlanda, kaj Malajzia.**



LUDETO pri la RIĈECO de ESPERANTO

Ni scias ke la lingvo internacia estas riĉa kaj simpla ; ĝi fakte posedas vortojn, kiujn ni tuj komprenas sen kiu ajn malfacilo, sed kiujn ofte ni ne kapablus traduki al la franca per unu nura samsignifa vorto. Tia franca vorto tamen plejofte ekzistas, sed ĝi estas rare uzita, kaj tial ĝi ofte eĉ ne estas konata.

Jen ĉi sube 20 ekzemploj el multegaj aliaj eblaj ; kiel vi tradukus al la franca, per unu nura ekvivalenta vorto, la jenajn esperantaj vortojn ?

- | | | | | |
|-----------------|------------------|--------------|-------------|--------------|
| 1 Manĝado | 2 Trinkado | 3 Fratina | 4 Nevelkema | 5 Senoreligi |
| 6 Priedzina | 7 Edzinmurdo | 8 Inka | 9 Senvosta | 10 Onkla |
| 11 Kuracistino | 12 Proverbistiko | 13 Haŭtnigra | 14 Lunano | 15 Bovida |
| 16 Dudekvarhora | 17 Senmenstrueco | 18 Lagistiko | 19 Aprido | 20 Kamelido |

La solvoj troviĝas sur la lasta paĝo de la nuna bulteno.

Ni rimarku ke por multaj aliaj esperantaj vortoj, la solvo ne ekzistus, oni devus, por ilin traduki al la franca, uzi perifrason. Kelkaj ekzemploj :

Ŝtela : ? (Liaj ŝtelaj sukcesoj li instigis daŭrigi ---> Ses succès en matière de vol l'incitèrent à continuer)

Konfuzebla, nekonfuzebla : que l'on peut confondre, impossible à confondre.

Samurbano, samvilaĝano, samstratano, samkvartalano, samprovincano, samplanetano habitant de la même ville, du même village, de la même rue, du même quartier, etc ...

Samjarulo, samkolorulo, samlingvano (isoglosse!?), **samideano...**

Pedikino : un poux femelle.

Ezokino : Une brochette ? !!!! ☺

Henri ROUSSEAU



Esperanto estis 125 jara la 26an de julio 2012

Finnlanda poŝtmarko eldonita okaze de la 125a jariĝo





Hérouville-Esperanto **organizis sian unuan staĝon**

Sabaton kaj dimanĉon, la 17an kaj 18an de novembro 2012, la esperanta klubo de Hérouville-Saint-Clair organizis sian unuan staĝon por komencantoj kaj progresantoj. Tridek kvar personoj* ĉeestis, gviditaj de Svetlana SMETANINA, moskva esperantistino kiu profesie agadas en Rusio kaj en diversaj eŭropaj landoj.

Ĉiuj, ĉu la ok komencantoj, ĉu la dudek ses progresantoj, ege ĝojis pro la alta nivelo de la kursoj, la amika etoso kaj la belaj lokoj kiujn la asocio "La Voix des Femmes" (la Voĉo de Virinoj) disponigis al nia asocio.

La tri komunaj manĝoj, tre abundaj, bone akvumitaj de bonaj vinoj (kelkaj alportitaj de partoprenantoj) estis agrable taksitaj. Ĉiuj estis lacaj je la fino de la staĝo sed kvazaŭ ĉiuj jam deziras, ke Hérouville-Esperanto denove organizu novan staĝon venontjare. Kial ne ? Ĉu la loka teamo havos sufiĉe da fortoj ?

Restas nun danki s-inon Svetlana SMETANINA sen kiu tiu ĉi staĝo ne estus tiel plene fruktodona.

GIGI SÉNÉCAL

* El kiuj departementoj venis la staĝantoj ?

- el Lot-et-Garonne : 1
- el Loir-et-Cher : 1
- el Essonne : 1
- el Eure : 1
- el Manche : 4
- el Orne : 5
- el Calvados : 21



Svetlana SMETANINA

ESPERANTO - NORMANDIE

Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures



KOTIZO-ABONO al ESPERANTO-NORMANDIE

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**

Abon-kotizo por 2013 : 8 Eŭroj, kaj sendu ĝin al la kasisto. Antaŭdankon !

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.



Staĝantoj la 17an de novembro 2012

AGRABLAJN FESTO- TAGOJN ! por ĉiuj !



Kotizoj - Abonoj por 2013 :



Gigi SENEAL, Svetlana kaj Gérard SENEAL.

SAT-AMIKARO : 132/134 Boulevard Vincent Auriol 75013 Paris. Tel. : 01.44.24.50.48.

www.sat-amikaro.org

CCP. : 37.852.90.L 033 La Source.

Cotisation + abonnement à « La Sago » : 35,00 €

Abonnement simple «La Sago» sans adhésion 32,00 €

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda : 67 avenue Gambetta. 75020 Paris. Tel. : 01.47.97.71.90.

www.satesperanto.org

Cotisation à SAT + abonnement à « Sennaciulo »

(11 n°s) : 52,00 €

Pierre QUILLAUD, 16 rue du Lt de Vaisseau Paris.

76120 Le Grand Quevilly.

CCP. : SAT-PERANTO : 17.333.10.N. Paris.

Esperanto France 4 bis rue de la Cerisaie 75014 Paris

Tel. : 09.51.77.18.33. www.esperanto-france.org

Cotisation : (chômeurs : 15 €) 39,00 €

Abonnement au « Monde de l'Esperanto » : 18,00 €

• Universala Esperanto Asocio :

Cotisation : (avec Jarlibro) 25,00 €

Cotisation, tarif réduit : (sans Jarlibro) 10,00 €

Cotisation avec abonnement à la revue « Esperanto » : 61,00 €

• Esperanto-Jeunes :

Cotisation « Espéranto-Jeunes »

+« Espéranto-France » : 30,00 €

d° - pour étudiants, chômeurs : 15,00 €

• TEJO : (Association mondiale des Jeunes) :

Cotisation + abonnement à « Kontakto » : 25,00 €

- d° - + abonnement à la revue « Esperanto » 61,00 €

Esperanto-INFO : Les Bories de Coperlac.

Mas de Saint Chély. 48210 Sainte Enimie.

Tel. : 04.66.48.58.48

CCP. : n°11.901.46.B 029 Marseille.

Abonnement + Adhésion: (6 n°s) : 20,00 €

SOLVOJ de la DEMANDOJ. LUDETO (Paĝo 4a)

- | | | | | |
|-------------------------------------|-----------------|----------------|----------------------------|-------------------------|
| 1 Manducation | 2 Bibition | 3 Sororal | 4 Immarcescible | 5 Essoriller (?*) |
| 6 Uxorien | 7 Uxoricide | 8 Atramentaire | 9 Anoure (?*) (Anomoures*) | 10 Avunculaire |
| 11 iatrine (anc. Français : mirese) | 12 Parémiologie | 13 Mélanoderme | 14 Sélénite | 15 Vitulaire |
| 16 Circadien | 17 Aménorrhée | 18 Limnologie | 19 marcassin | 20 Chamelon (Chamelet*) |

(*) Dank'al tiu amuza ludeto de nia amiko ROUSSEAU, mi plezure profundigis en legadon de la du volumoj « Le ROBERT - Dictionnaire historique de la langue française verkita de Alain REY - 2400 paĝoj !!! Eldonita en 1992. (P. Lemarchand.)